

Novajaĵoj Tamtamas

横浜エスペラント会のエスペラント文会報

Internacia Gazeto de Jokohama Esperanto-Rondo (JER, Hama-Rondo)

Niaj Klasoj kaj Kursoj

En Kanagaŭa-Kenmin Sentaa (= Centro por la gubernianoj de Kanagawa), ĉirkaŭ la Stacidomo Yokohama, okazas jenaj klasoj.

*Regulaj Klasoj en sabato: (1) Meza klaso gvidata de Doi Ĉieko; de junio oni lernas per kroata rakonto "Mirindaj Aventuroj de Metilernanto Hlapiĉ" . / (2) Klaso por legado de "Vivo de Lanti" / (3) Jokohama Salono / (4) Rudimenta kurso, gvidata de Fuse Kentarou, nun kun 5 lernantoj.

*Regulaj Klasoj en merkredo: (1) Post legado de "Barbro kaj Eriko", lernantoj skribis la supozatan daŭrigon de la rakonto – ĉi-numere vi legos. Nun legata estas "Karlo". / (2) Daŭriga kurso, per la posta parto de "Hanako lernas Esperanton".

TIEL OKAZIS

en Hama-Ronda Vespero

*la 17-a de majo, 17h00-19h00, ĉe la regula kunvenejo

20 anoj aŭskultis prezenton pri la itala urbo Bolonjo, faritan de s-ro Glauco Pompilio, naskiĝinta kaj kreskinta en tiu ĉi urbo. Li uzis multajn fotojn, senditajn de sia parenco en tiu urbo.

Jen kelkaj punktoj; La urbo havas longan historion, kaj oni hodiaŭ vidas kelkajn 'turojn', eĉ klinitan. Sed historie, estis multege da turoj, kiel videblaj en la montrita foto. Tiel estis, ĉar la riĉuloj konkure starigis altajn turojn, simbolo de sia riĉeco. En la urbo fluas akvokanaloj, kaj eĉ nuntempe sed apenaŭ troveble, ĉar hodiaŭ la kanaloj estas preskaŭ kaŝitaj.



- Eldonas Sibayama Zyun'iti ■ Redaktas la organa fako de JER: Sibayama Zyun'iti
- Poŝtadreso: n-ro 85 CPO, Yokohama, Japanio (JP-220-8691) ■ Telekopio: +81-45-785-5458
- Redaktejo: tamtamo@googlegroups.com ■ TTT-ejo: <http://www.hamarondo.org>
- Abono: jare 1500 enoj, aŭ 10 eŭroj ■ uea-konto: jokr-j (Jokohama Esperanto-Rondo)

NIAJ PLANOJ

Venonta Hama-Ronda Vespero

*la 21-a de junio, 17h00-19h00, ĉe la regula kunvenejo

Pri la retejo de nia rondo parolos s-ro Nanba Humiharu, la zorganto de la retejo. Laŭ li, la retejo estas modifebla de tiuj, kiuj konas pasvorton. Do ni lernos kiel fari tion.

Parol-Kurso de Wajik

*la 26-a de julio, 15h00-17h00, ĉe la regula kunvenejo

En tiu tago, kelkaj el la rondanoj estos en la 99-a Universala Kongreso en Argentino. Do la restantaj personoj havos specialan parol-kurson de Wajik Iwanicki, nia rondano deveninta de Rusio.



Kio poste okazis al Barbro kaj Eriko?

“Barbro kaj Eriko” estas facila legolibro en kiu sveda junulino Barbro kaj aŭstra junulo Eriko korespondadis en Esperanto en 1930-aj jaroj. La korespondado daŭris ĉirkaŭ naŭ monatojn, kaj la rakonto finiĝis per ilia okazonta reala renkontiĝo.

En nia kurso post la finlego de la libro la kursanoj skribis, kio poste okazis al Barbro kaj Eriko.

Bonvolu legi kaj ankaŭ vi mem skribu sekvon de la libro.

(Doi Ĉieko)



(1)

Miyakawa Masako

La vivo estas stranga. Se oni esperadas, ĉiam la deziro realiĝas dank’ al Dio.

Baldaŭ alvenos Eriko kaj lia frato. Ŝi atendegas kun la streĉita kolo. Ŝia patro iomete komprenis Esperanton sub ŝia gvido. Finfine ili venis. Li estas altstatura, ekster ŝia supozo.

Ili vojaĝis per biciklo kaj tendo, kaj pasigis tagojn kun siaj Esperantaj amikoj. Ili pasigis tian agrablan tempon neniam antaŭe spertitan. Sed tia agrabla tempo ne daŭris longe.

Fine venis la tago, en kiu Eriko kaj la frato foriros de Svedujo. Ŝi detenis sin de esploro, ĉar ŝi devis prizorgi sian patron kaj la tombon de Panjo kaj la frato en Svedujo.

Barbro adiaŭis kun la promeso reskribi al Eriko.

(2)

Shibata Kazumi

Finfine Eriko sukcesis vojaĝi per biciklo kaj tendo al Svedujo, kiun li revis ekde kiam li estis infano.

Barbro kaj Eriko havis belan tempon, vizitante grandajn arbarojn, lagojn kaj la nordlumon.

Barbro eĉ rakontis al li pri la eksterlandanoj, kiuj instruis Esperanton en Svedujo, esperante, ke li transloĝiĝos tien.

Ĝenerale rakontoj finiĝas per la vortoj: ili geedziĝis, estis feliĉaj, kaj havis multajn infanojn. Ĉu tiel fini ĉi tiun? Ne, tio ne okazis.

Post kiam li revenis hejmen, ili dum iom pli ol du jaroj daŭrigis sian leteran kontakton. Eriko pensis pri la ebleco edziĝi al Barbro. Sed li devus fariĝi kamparano por edziĝi al ŝi, ĉar ŝi ne povus forlasi sian landon pro sia patro por prizorgi.

Eriko estis ankoraŭ juna. La mondo malfermiĝis antaŭ li. Li deziris esplori diversajn eblecojn kiujn li havis antaŭ si.

Montriĝis, ke ili iom post iom forgesis unu la alian.

(3)

Morija Ŝigeko

Eriko iris al Svedujo kun sia frato. Post longa tempo li venis al Svedujo, kaj li decidis fariĝi instruisto de Esperanto tie.

Li diris al Barbro, ke li enmigros en Svedujon, ĉar li volis helpi ŝin kaj ŝian patron. Kompreneble ankaŭ la biendomoj svedaj plaĉis

al li.


Barbro tre ĝojis kaj dankis lin pro lia propono. Eriko pensis: se li havos profesion, li deziras peti pri la geedziĝo.

En Svedujo li celis fariĝi instruisto. Post tri jaroj Eriko sukcese plenumis sian revon. Gratulon!

(4)

Isiguro Tomoko

Barbro en revo kun diversaj imagoj atendadis, ke la du aŭstraj junuloj venos. Tio povas okazi, sed ŝi maltrankviliĝis ofte.



Same okazis ankaŭ suferiga okazaĵo al Eriko kaj lia frato. Subite la riskema frato ekdiris, kiam la du fratoj alvenis Kopenhagon en Danujo: “Mi deziras iri al Bremen en Germanujo.”

Eriko decidis daŭrigi sian vojaĝon kun granda maltrankvilo sed mirinda memfido, ĉar li pensis, ke plej grave estas plenumi promeson al Barbro. Li sendis telegramon el poŝtoŝeĵo al Barbro.

Baldaŭ iu staris antaŭ la pordo de ŝia domo. Barbro malfermis la pordon, kaj samtempe ŝi rekonis la viron. Estis Eriko, ĉar li portis en la mano tre makulitan biciklon.

BELETRO

Du malgrandaj mortoj (1)

Originale verkita de Vasilij Eroŝenko en la japana: 「二つの小さな死」

tradukita de Murata Kazuyo

(1)

Estis tago varmeta en agrabla printempo. En alta blua ĉielo la suno libere vojaĝis de oriento al okcidento. De tempo al tempo belaj nubopecoj flugis glate kaj malpeze en la blua ĉielo, kvazaŭ veturus rozkolora ŝipo sur la blua kaj kvietaj maro. Alaŭdoj postsekvis ilin kantante gajan kanton, supreniris alten kaj alten ĝis ne videbla alteco.

Kvieta estis malsanulejo, konstruita en la suburbo. Kaj florejo de la malsanulejo, kaj malsanuloj rigardantaj la florejon, ĉiuj estis kvietaj. En speciala ĉambro de la malsanulejo, riĉa sinjoreto atendis alvenon de la Morto. Por ke li ne sentu solecon, apud li kuŝis granda ĝentila hundo San-Bernarda*. En kaĝo aminda paro da kanarioj kriete kantis bele. Plantitaj en potoj, belaj floroj multis en la ĉambro.

De la kontraŭa ĉambro, filo de laborista familio ĉiam sendadis afablan rideton al la sinjoreto, por ke tiu neniam estu malĝoja. Ankaŭ la filo estis unu el tiuj, kiuj atendis la Morton. Ek de infanaĝo li ŝajnis esti infano atendanta la Morton. Kiam li suĉis lakton de sia malsaneta patrino, kiam li kreskinta helpis la patrinon, kiam li laboris en la granda fabriko, kie laboris lia patro, ĉiam li atendis la Morton. Ĉiuj, kiuj vidis lin, nepre demandis sin, kial la Morto ankoraŭ ne venis al li, kial ĝi malfruiĝis.

Sed en la ĉambro de la knabo nek estis ĝentila

hundo San-Bernarda konsolanta lin por ke li ne sentu sin sola, nek amindaj kanarioj en kaĝo, nek belaj floroj en florpotoj. La filo de la laboristo tamen sentis varman simpation kaj fratecan amon al la riĉa sinjoreto, kiu rigardas la brilan sunon vojaĝantan libere de oriento al okcidento, kaj la belajn rozkolorajn nubopecojn flugantajn en la blua ĉielo kvazaŭ malpeza ŝipo, de la fenestro kontraŭa, same kiel li mem.

Kaj li sentis, ke la hundo de la sinjoreto, la kanarioj kaj la florpotoj — ĉiuj estas siaj propraj posedaĵoj. Li tiel amis la sinjoreton, kaj tiel profunde sentis simpation al li.

(2)

Ebria de aromo printempa, la Morto senbrue travagis en la malsanulejo, kaŝante sian vizaĝon per blanka vualo, sensone svingante arĝentan falĉilon...

“Ĉiuj mortos. Ĉiuj naskiĝis por morto. Junuloj, maljunuloj, beluloj, malbeluloj, homoj amataj, homoj ne amataj, malriĉuloj, riĉuloj, saĝuloj, malsaĝuloj, reĝoj, malnobluloj, mortos ĉiuj. Por mi ne trovas sin distingo inter ĉiuj homoj. Estas mi vera anarkiisto. Estas mi pretendanto de egaleco. La floroj floras ja por morti. La birdoj kantas ja por morti. La homoj spiras ja por morti. Tre plezure, ĝojege!! Mi amas detruon. Detruo estas tre ekscita por mi.”

Murmurante tiel la Morto trapaŝis kviete,

kaŝante sian vizaĝon per la blanka vualo, ŝvingante la arĝentan falĉilon...

Sed neniu aŭdis la voĉon de la Morto. Aŭ pro la gajaj kantoj de alaŭdoj rekte suprenflugantaj al la ĉielo por sekvi la helruĝajn nubopecojn veturantajn en la blua ĉielo kiel ŝipo, aŭ pro la aromo de belaj floroj sekrete frustrantaj al ĝentila printempa vento, neniu aŭdis la voĉon de la Morto.

La Morto senbrue eniris en la ĉambron de la filo de la laboristo. Sed li, rigardanta la bluan koloron de la ĉielo, ne rimarkis ties proksimiĝon.

“Hej, hej bubaĉo! Ne estu foranimita! Vi jam devas morti.”

La knabo mirige vidis la vizaĝon de la Morto, kaŝitan de la vualo.

“Ĉu mi mortos...? Ĉu mi vivas ĝis nun...?”

“Ve, ĉu vi ne sciis, ke vi vivas ĝis nun!”

“Mi neniam sciis, ke mi vivas. Sed nur hodiaŭ, mi dubeme sentis, ial mi vivas...”

“Kiel malsagaca vi estas! Tial mi malŝatas laboristojn. Ili pensas, ke estas same por ili vivi aŭ morti. Ili tute ne komprenas la valoron de vivo. Tute ne estas inde, ke mi forstrekas ilian vivon!”

Li diris kvazaŭ al si mem, kaj denove alparolis la knabon.

“Hej bubaĉo, mi iom plilongigos vian vivon, sed anstataŭe vi devas fordoni al mi la vivon de via plej amata amiko, ĉu komprenite?!”

“Ĉu la vivon de mia amiko?”

La knabo mire alrigardis la vizaĝon malantaŭ la blanka vualo.

“Jes, ja. La vivon de la riĉa sinjoreto.”

La pinton de la akra falĉilo brilanta arĝente direktis la Morto al la riĉula sinjoreto, kiu rigardis la bluan ĉielon ĉe la fenestro.

“La vivo de la sinjoreto estas lia propra. Tio ne koncernas min. Kial mi povas fordoni ĝin al vi!”

“Ĉesu diri bagatelan rezonon! Ĉiu vivo de la homoj amataj de vi dependas de via mano. Vi nur bezonas diri, ke vi fordonos ĝin al mi.”

La filo firme rigardis ties vizaĝon duboplene.

“Ĉu estas vero, ke la vivo de la homoj amataj de mi apartenas al mi?”

“Jes, tial diru tuj, ke vi fordonos ĝin al mi!”

La filo de la laboristo ridis kviete.

“Ĉu trovas sin tiel malŝatata homo kiel laboristo?! Vi estas tro aroganta.”

La Morto ŝvingis la arĝentan falĉilon krudaĉe. La filo denove ridis.

“Mi unuafoje komprenas, ke mi vivas. Ĝoja, ĝojega estas mi. Mi do ridas.”

“Ne ridu, ne diru tiel! Tuj fordonu al mi la vivon de la riĉa sinjoreto!”

“Absolute ne! Se la vivo de la homo amata de mi estas en mia mano, tio ne estas por doni ĝin al la Morto, sed por defendi ĝin de la Morto.”

“Vi arbitre rezonaĉas nur ĉikane. Tial mi malamas la laboristojn. Hej, bubaĉo. Ne restas tempo por heziti. Aŭ vi fordonu la vivon de via amiko, aŭ vi mortu mem, ne alie.”

“Mi mem mortos.”

Tiel dirante la filo ridis riĉkore.

“Vi ankoraŭ ne komprenas la valoron de vivo. Kiel malsagaca vi estas!”

Dirante tiel al si mem, la Morto ŝvingadis la arĝentan falĉilon nerve.

“Bone, do. Jam lasu la vivon de la amiko, fordonu al mi la vivon de la hundo San-Bernarda.”

“Ne, mi ne fordonos. Al la Morto mi fordonos nenion alian ol mian vivon.”

“Malsagaca estas vi! Ĉu la vivon de la kanario vi fordonos al mi?”

“Ne, eĉ ne la vivon de la kanario.”

“Kiel do, la vivon de la floroj?”

“Nek tion.”

“Kiel malsagaca vi estas! Vi neniam komprenas la valoron de via vivo. Tial mi malŝatas la laboristojn!”

Solparolante kun malagrable mieno, la Morto denove alparolis krude al la knabo.

“Hej, bubaĉo! Preparu vin al morto.”

La Morto kviete eliris de la ĉambro. La filo de la laboristo ankoraŭ ridetas.

“Ho, ĝoje! Oh, ĝoje! Mi vivas.

Mi unuafoje klare komprenas, ke mi

vivas. Mi sentas tion pli forte ol ion ajn alian. Ĝoje, ĝoje.”

La filo de la laboristo sola ĝojadis.

(daŭrigota)

*hundo San-Bernarda: raso de granda hundo, devenanta de sav-hundoj breditaj en la monaĥejo de la montpasejo Granda Sankta Bernardo, en la Alpoj. (Noto de Takasugi Iĉiroo, la kompilinto de la japanlingva Verkaro de Eroŝenko)

(Noto de la redaktanto) Tiu ĉi rakonto estas unu el la verkoj de Eroŝenko unuafoje tradukitaj en Esperanton.

